Fervoja Esperantisto

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio
Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

GEFA
STIFTUNGSFAMILIE
BSW & EWH

Numero 4 Oktobro - Decembro 2021

PTKD sur la insulo

SPNV auf der Insel



Stacio Borkum – la lokomotivo „Münster“ atendas la ekveturon al la haveno
(Foto: Bodo Ehrlich)
vd. paĝon 7

Bahnhof Borkum – die Lokomotive „Münster“ wartet auf die Abfahrt zum Hafen
(Foto: Bodo Ehrlich)
s. Seite 7

Karaj gelegantoj	2	Liebe Leserinnen und Leser	2
Postsezono en Schönau	3	Nachsaison in Schönau	3
Ne serĉita kaj tamen trovita	6	Nicht gesucht und doch gefunden	6
Borkumer Kleinbahn	7	Borkumer Kleinbahn	7
Invito al Beroun	9	Einladung nach Beroun	9
Annelies Rudolf 07.07.1942 - 25.09.2021	11	Annelies Rudolf 07.07.1942 - 25.09.2021	11
Surteraj tagoj	12	Äerdendage	12
GEFA-anoncoj, redakcio	12	GEFA-Mitteilungen, Redaktion	12

Karaj gelegantoj,



dum mi grimpas el la trajno kaj forlasas la kajon mi deprenas mian maskon kaj klopodas reglatigi miajn elefanto-orelojn. La revojo de Schönau daŭris dek kvin horojn kaj nur ĉe la bavara landlimo mi por momento malstreĉis la orelkonkojn interŝanĝante la bavaran kontraŭ la cetergermana masko.

Vojaĝo estas investo, de tempo, de fortoj, de pli aŭ malpli da mono. Sed la renkonto kun samideanoj kaj la kolekto de impresoj estas granda kontraŭvaloro. Tial kvankam ni estas tute kontentaj pri la rezulto de la nure reta TRAKO-kongreso en Majo, ni ĝojas pri ĉiu okazo partopreni aranĝon ĉeeste.

Tamen la kontinue kreskantaj infektonombroj spite relative sukcesajn vakcinokampanjojn ne nutras esperon ke la senbrida normaleco en la renkontoj baldaŭ revenos. Kaj ĝi ne nutras la esperon, ke la evidenta inklino al malprudento miskomprenata kiel individua libereco baldaŭ cedos al konscio pri la respondeco por aliaj homoj kaj socia interkompreniĝo.

Ke ni esperantistoj iel trovas vojon inter la obstakloj, montras la sukcesaj retaj ofertoj de diversaj asocioj kaj iomete ankaŭ la hibrida kunveno en Schönau kun la IFEF-estraro. Tiu sperto por GEFA ankoraŭ estis nova. Ĝi tamen rezultigis decidon havigi favorprezan sed konvenan teknikon por ankaŭ estonte doni al foraj gastoj la okazon partopreni ĉeestajn kunvenojn.

Kore salutas



Guido Brandenburg

Liebe Leserinnen und Leser,

während ich aus dem Zug steige und den Bahnsteig verlasse, nehme ich die Maske ab und bemühe mich, meine Elefantenohren wieder zu glätten. Der Rückweg aus Schönau hat fünfzehn Stunden gedauert, und nur an der Bayrischen Landesgrenze hatte ich für einen Moment die Ohrmuscheln entspannt, beim Austauch der bayrischen gegen die restdeutsche Maske.

Eine Reise ist eine Investition, von Zeit, von Kraft, von mehr oder weniger Geld. Aber die Begegnung mit Gleichgesinnten und die Sammlung von Eindrücken ist ein großer Gegenwert. Darum freuen wir uns, obwohl ganz zufrieden mit dem Ergebnis des ausschließlich im Netz stattgefundenen TRAKO-Kongresses im Mai, über jede Gelegenheit, an einer Veranstaltung präsent teilzunehmen.

Jedoch nähren die andauernd steigenden Infektionszahlen trotz verhältnismäßig erfolgreicher Impfkampagnen nicht die Hoffnung, dass die hemmungslose Normalität in den Begegnungen bald zurückkehrt. Und sie nährt auch nicht die Hoffnung, dass die offensichtliche Neigung zur Unvernunft, missverstanden als individuelle Freiheit, bald einem Bewusstsein der Verantwortung gegenüber anderen Menschen und einer gesellschaftlichen Verständigung weicht.

Dass wir Esperantosprecher irgendwie einen Weg zwischen den Hindernissen finden, zeigen die erfolgreichen Angebote verschiedener Verbände im Netz und ein wenig auch das hybride Treffen in Schönau mit dem IFEF-Vorstand. Diese Erfahrung war für die GEFA noch neu. Sie hat aber zu dem Entschluss geführt eine kostengünstige aber passende Technik zu beschaffen, um auch künftig entfernten Gästen Gelegenheit zu geben an Präsenztreffen teilzunehmen.

Es grüßt euch

Guido Brandenburg



Malgranda sed gaja – la grupo antaŭ la Romy-Schneider-muzeo Schönau
Klein aber fröhlich – die Gruppe vor dem Romy-Schneider-Museum Schönau
(Foto: Alfred Schubert)

Postsezono en Schönau

Mallaŭtiĝas la klakado de la migrobastonoj, mutiĝas sub vintra kovraĵo la plaŭdo de apudvojaj putoj, kovras prujno la matenan herbon, daŭras ĝis laca suno estas forpelinta la nebulon kaj vidiĝas la imponaj rokoj ĉirkaŭantaj la valon. Kolektiĝis malgranda sed bonhumora grupo post invito de GEFA por festi la jarkunvenon – festi, ĉar longan tempon la infektoprotekta regularo estis tro strikta por aranĝi kunvenon realan, ne sole okazantan antaŭ komputilaj ekranoj.
Haus Hubertus estas la plej sudoriente situanta hotelo de la fondaĵo BSW kaj postulas longajn alvojaĝojn de siaj gastoj. Pro tio alie ol dum antaŭaj GEFA-jarkunvenoj la komenco estis metita al la antaŭsemajnfina ĵaŭdo: Ĝi ja valoru la vojon kaj lasu apud la asociaj formalaĵoj sufiĉan spacon por admiri la naturon.

Nachsaison in Schönau

Das Klappern der Wanderstöcke wird leiser, unter der Winterabdeckung verstummt das Plätschern der Brunnen am Weg, Rauhreif bedeckt das morgendliche Gras, es dauert bis die müde Sonne den Nebel vertrieben hat und sich die eindrucksvollen Felsen zeigen, die das Tal umgeben. Es hat sich eine kleine aber gutgelaunte Gruppe nach Einladung der GEFA versammelt, um ihr Jahrestreffen zu feiern – feiern, weil lange Zeit die Infektionsschutzregeln zu streng waren, um eine reale Zusammenkunft zu veranstalten, die nicht allein vor Computerbildschirmen stattfindet.
Haus Hubertus ist das am südöstlichsten gelegene Hotel der Stiftung BSW und fordert lange Anreisen von seinen Gästen. Darum war anders als bei vorherigen Jahrestreffen der Anfang auf den Donnerstag vor dem Wochen-

Tutsimple nenio alia estas ebla starante antaŭ mil okcent metrojn alta roka muro aŭ glitante en ŝipeto trans la trankvilan akvon de la Königssee-lago. Ĝi estas pejzaĝo de ekstremoj kun klarega akvo, kun altegaj montoj, kun najbareco de neĝokovritaj pintoj kaj preskaŭ somervarma bierĝardeno ĉe Sankta Bartolomeo, kie ni tagmanĝis dum la duontaga ekskurso la vendredon matene. Ni sidis tie sur biertendaj benkoj kaj plenbuŝe diskutis pri blankaj kolbasoj, tektonismaj movoj de la tersurfaco kaj la klimatamike ĝusta maniero trakti arbarojn – aŭ ĉu trakti entute?



La flago mezuras 2,70 x 2,88 metrojn.
Faldi ĝin ne estas tute simple.
Die Flagge misst 2,70 x 2,88 Meter.
Sie zu falten ist nicht ganz einfach.
(Foto: Alfred Schubert)

Berchtesgaden indas viziton kun siaj pentre ornamitaj fasadoj, Schönaŭ kiel bazo por ekskursoj en regiono de ĉiam ŝanĝiĝantaj perspektivoj, sed kun konvenaj vestaĵoj, konvenaj ŝuoj kaj sufiĉa tempo.

La Romy-Schneider-muzeon – kvankam ni uzis ĝin kiel propagandilon en invito al la renkontiĝo – ni ne vizitis sed nur elektis kiel taugan fonon por la grupfoto - konvena pro sia historio kiel stacidomo de malaperinta fervojlinio. Mankis la vere ardantaj Sissi-adeptoj en nia trupo.

Karaj gastoj de la jarkunveno venis aŭtomobile el la Ĉeĥa Respubliko. Ladislav kaj Jaroslava Kovář reprezentis ĈeFEA, la landan asocion de IFEF, kiu organizas la sekvontan, la 73-an fervojistan kongreson en Beroun. Kiel prezidanto de la Loka Kongresa Komitato Ladislav varbis por la aranĝo kaj vekis nian apetiton per filmeto, multaj komentoj kaj klarigoj kaj per ende gelegt: Es sollte ja den Weg lohnen und sollte neben den Verbandsformalitäten genügend Raum lassen, um die Natur zu bewundern. Etwas anderes ist ganz einfach nicht möglich, wenn man vor einer achthundert Meter hohen Felswand steht oder in einem kleinen Boot über das ruhige Wasser des Königssees gleitet. Es ist eine Landschaft der Extreme, mit glasklarem Wasser, mit riesigen Bergen, mit der Nachbarschaft von schneebedeckten Gipfeln und einem fast sommerlich warmen Biergarten bei St. Bartholomä, wo wir bei dem Halbtagsausflug am Freitagmorgen zu Mittag gegessen haben. Wir saßen dort auf Bierzeltbänken und diskutierten mit vollem Mund über Weißwürste, tektonische Bewe-



La IFEF-estraro observas ĉion el la reto.
Der IFEF-Vorstand beobachtet alles aus dem Netz.
(Foto: Alfred Schubert)

gungen der Erdoberfläche und die klimafreundliche Behandlung von Wäldern - oder sie überhaupt zu behandeln?

Berchtesgaden ist einen Besuch wert mit seinen gemäldeverzierten Fassaden, Schönau als Basis für Exkursionen in einer Region sich stetig verändernder Perspektiven, aber mit passender Kleidung, passenden Schuhen und ausreichend Zeit.

Das Romy-Schneider-Museum – obwohl wir es als Werbemittel in der Einladung zu dem Treffen verwendet hatten – haben wir nicht besucht, sondern nur als tauglichen Hintergrund für unser Gruppenfoto ausgewählt – tauglich wegen seiner Geschichte als Bahnhof einer verschwundenen Eisenbahnstrecke. Es fehlten die wirklich glühenden Sissi-Verehrer in unserer Truppe.

majstre aranĝita broŝuro tro modeste titolita „informilo“.
La retricevantoj de nia gazeto trovos en sia mesaĝo aldone la aliĝilon.
Kadre de vespera kunveno kiun hibride ankaŭ partoprenis la IFEF-estraro Ladislav povis transpreni la kongresan flagon (la „Sanktan Tukon“) de IFEF - transpreni de GEFA, kiu ĝin ricevis siaflanke en la jaro 2019 en Malago, dum ankoraŭ neniu el ni povis imagi la koronviruson kaj ĝian influon ankaŭ al la esperantistaj aranĝoj. Kvankam prognozoj ĉiam estas riskaj ni estas konvinkitaj, ke la 73-a IFK povos sukcese okazi surloke kaj en la maniero kiun ni konas kaj amas.



La laste aldonita teksto sur la flago estas
„72. TRAKO 2021 virtuala“
Der zuletzt angefügte Text auf der Flagge ist
„72. TRAKO 2021 virtuala“
(Foto: Alfred Schubert)

Kio plie rakontenda?
Ni spektis prelegetojn diverstemajn, ni iom kantis, ĉiu hejmenportis loterian premion. Kompreneble la funkciuloj priparolis la rezultojn de la virtuala 72-a IFK, organizajn kaj financajn aferojn kaj siajn planojn por la sekvonta jaro. Ni ĝojis pri la partopreno de Barbara, nia „patronino“ en la centralo de la fondaĵfamilio BSW&EWH kaj ni ĝuis la malfruajn vizitojn en la hotela kelo.
Ĉiam necesis konscii pri la ĉirkaŭe rekreskantaj infektonombroj. Maskitaj kaj desinfektitaj ni moviĝis en publika trafiko kaj en la domo, ofte tamen forgesantaj la trafikregulojn en la

Liebe Gäste des Jahrestreffens waren mit dem Auto aus der Tschechischen Republik gekommen. Ladislav und Jaroslava Kovář vertraten die ČeFEA, den Landesverband der IFEF, der den kommenden, den 73. Eisenbahnerkongress in Beroun organisieren. Als Vorsitzender des örtlichen Vorbereitungskomitees warb Ladislav für die Veranstaltung und weckte unseren Appetit mit einem kleinen Film, vielen Kommentaren und Erklärungen und einer meisterlich arrangierten Broschüre mit dem viel zu bescheidenen Titel „Infoblatt“. Die elektronischen Bezieher unserer Zeitung finden das Anmeldeformular im Anhang ihrer Mail-Nachricht.
Im Rahmen einer abendlichen Zusammenkunft, an der hybrid auch der IFEF-Vorstand teilnahm, konnte Ladislav die Kongressflagge (das „Heilige Tuch“) der IFEF übernehmen – übernehmen von der GEFA, die es ihrerseits im Jahr 2019 in Málaga bekommen hatte, als noch keiner von uns sich das Corona-Virus vorstellen konnte und seinen Einfluss auch auf die Veranstaltungen der Esperantisten. Auch wenn Prognosen immer riskant sind, sind wir überzeugt, dass der 73. IFK erfolgreich vor Ort stattfinden kann und in der Art und Weise, die wir kennen und lieben.
Was gibt es weiter zu erzählen?
Wir haben uns kleine Vorträge mit verschiedenen Themen angesehen, wir haben ein wenig gesungen, jeder trug einen Lotteriegewinn nach Hause. Selbstverständlich besprachen die Funktionäre die Ergebnisse des virtuellen 72. IFK, organisatorische und finanzielle Angelegenheiten und ihre Pläne für das folgende Jahr. Wir freuten uns über die Teilnahme unserer „Schirmherrin“ Barbara aus der Zentrale der Stiftungsfamilie BSW&EWH und genossen die späten Besuche im Keller des Hotels.
Es war immer notwendig, sich der im Umkreis wieder steigenden Infektionszahlen bewusst zu sein. Maskiert und desinfiziert bewegten wir uns im öffentlichen Verkehr und im Haus, und vergaßen doch oft die Verkehrsregeln in den Fluren, den Treppenhäusern und zwi-

koridoroj, la ŝtuparejoj kaj inter la tabloj. Pri tiaj restriktoj ni kalkulu ankoraŭ longan tempon. Sed ili ne kapablos estingi la esperantistan vivon.
La sekvonta jarkunveno – tio estis la decido – okazu refoje en Bad Ems. Por multaj el ni tiu loko en la Lahn-valo inter Koblenz kaj Limburg havas grandajn trafikajn avantaĝojn.

Guido Brandenburg

schen den Tischen. Mit solchen Beschränkungen sollten wir noch lange Zeit rechnen. Aber sie werden das Esperanto-Leben nicht zum Erliegen bringen.
Das folgende Jahrestreffen – das war der Beschluss – soll erneut in Bad Ems stattfinden. Für viele von uns hat dieser Ort im Lahntal zwischen Koblenz und Limburg große verkehrliche Vorteile.

(trad. Brandenburg)



https://op.europa.eu/de/publication-detail/-/publication/e7008bfb-11dd-11ec-b4fe-01aa75ed71a1

Ne serĉita kaj tamen trovita

Ni volas sekvi sugeston de niaj legantoj instali regulan rubrikon pri interesaj trovitaĵoj en la reto, temoj renkontitaj pro hazardo. Ni scias ja: La reto estas plena da stultaĵo sed provizas okaze ankaŭ interesajn valoraĵojn.
La sekva estas unu el tiuj:

„Nia lingvo estas historio tuŝebla permane“, getradukistoj de la 24 oficialaj lingvoj rigardas science kaj ofte sprite siajn denaskajn lingvojn. Ili rakontas i.a., ke ĝis fino de la mezepoko la finna ne estis skriba lingvo, pri la malbeno de la anglalingvanoj ne plu devige lerni fremdlingvojn, kiel IKEA mondvaste varbas por la sveda kaj la legaco de la araba en la portugala.

(trad. Brandenburg)

Nicht gesucht und doch gefunden

Wir wollen einer Anregung unserer Leser folgen, eine regelmäßige Rubrik über interessante Funde im Netz einzurichten, Themen denen zufällig begegnet wurde. Wir wissen ja: Das Netz ist voller Unsinn, hält aber gelegentlich auch interessante Schätze bereit.
Der folgende ist einer davon:

„Unsere Sprache ist eine Geschichte zum Anfassen“, Übersetzerinnen und Übersetzer der 24 EU-Amtssprachen blicken wissenschaftlich und oftmals mit Humor auf ihre Muttersprache. Sie erzählen u.a. dass Finnisch bis zum Ende des Mittelalters keine Schriftsprache war, über den Fluch der Englischsprachigen keine weiteren Fremdsprachen lernen zu müssen, wie IKEA weltweite Werbung für das Schwedische betreibt und über das Vermächtnis des Arabischen im Portugiesischen.

Bodo Ehrlich



La trajno atendas – la pramo alvenas / Der Zug wartet – die Fähre kommt an.
(Foto: Reinhard Dietrich, WikiMedia)

Borkumer Kleinbahn pasaĝertrafiko kurtdistanca sur la insulo

En la nuna jaro ni feriis sur la insulo Borkum. Ne estis la unua fojo. Sed nun ni ne loĝis en la BSW-hotelo Rote Erde sed en feria loĝejo proksima al la strando.
Specialaĵo – almenaŭ por fervojistoj – estas la dutraka etŝpura fervojo, kiu alkroĉas la havenon, en kiu albordiĝas la pramoj de Emden Außenhafen kaj de Eemshafen/NL kaj la motorkatamarano de Emden Außenhafen. Kompreneble ekzistas ankaŭ taksioj kiuj veturas de la haveno al la urbeto. Sed efektive krom la flugpasaĝeroj preskaŭ ĉiuj homoj, kiuj atingas Borkum, uzas la trajnojn. Survoje oni pasas la haltejon Jakob-von-Dyken-Weg kaj en Borkum

Die Borkumer Kleinbahn Schienenpersonennahverkehr auf der Insel

In diesem Jahr machten wir Urlaub auf der Insel Borkum. Es war nicht das erste Mal. Aber jetzt wohnten wir nicht im BSW-Hotel Rote Erde, sondern in einer Ferienwohnung nahe am Strand.
Eine Besonderheit – jedenfalls für Eisenbahner – ist die zweigleisige Schmalspurbahn, die den Hafen anbindet, in dem die Fähren von Emden Außenhafen und von Eemshafen/NL und der Katamaran von Emden Außenhafen anlegen. Selbstverständlich gibt es auch Taxen, die vom Hafen in das Städtchen fahren. Aber tatsächlich nutzen außer den Fluggästen fast alle Leute, die Borkum erreichen, die Züge. Unterwegs passiert man den Haltepunkt

stacio la trakoj finiĝas tutsimple en la stratpavimo – sen trakfina baraĵo.
La dutrakeco estas karakterizaĵo en Germanio unika ĉe etŝpuraj fervojoj. La linio estis konstruata en la jaro 1888. Nur en la komenco de la 20-a jarcento oni aldonis la duan trakon. La ŝpuro estas 900 mm (mi ĝin mem mezuris!).
La infrakstruktura kaj ekspluata kompanio „Borkumer Kleinbahn und Dampfschiffahrt GmbH“ disponas pri 7 dizelaj lokomotivoj, 1 vaporlokomotivo, 1 motorvagono, ĉirkaŭ 30 pasaĝervagonoj, diversaj vagonoj por bagaĝo kaj varoj kaj kelkaj aŭtobusoj.
La pasaĝervagonoj estas ekstere buntaj kaj portas nomojn laŭ la tiea dialekto kiel ekz. „Kiebitzdelle“ kaj „Tüskendöör“. Ene oni sidas sur lignaj benkoj. La kompanio ankaŭ ofertas ŝipekskursojn al la fokobenkoj kaj forluas biciklojn. Mendeblas ankaŭ specialaj veturoj ekz. kun la vaporlokomotivo.
En la stacio Borkum estas biletaŭtomatoj de DB kaj de NS. La biletoj inkluzivas ankaŭ la ŝipveturojn al la koncernaj landoj.



Pordego protektu la urbeton kontraŭ inundoj.
Ein Tor soll das Städtchen vor Überflutungen schützen
(Foto: Reinhard Dietrich, WikiMedia)

La vagonoj estas vartataj kaj riparataj en la riparejo „Werkstatt“ proksima al la stacio Borkum. La linio longas ĉirkaŭ 8 km kaj survoje kondukas tra barejo por trapasi la digon kiu ŝirmas la urbeton kontraŭ inundoj. La pordego estas fermebla kaze de bezono. Survoje al la haveno okazis, ke en direkto kontraŭa ni Jakob-von-Dyken-Weg und im Bahnhof Borkum enden die Gleise einfach im Straßenpflaster – ohne Prellbock.



La riparejo proksima al la stacio Borkum
das Betriebswerk nahe dem Bf Borkum
(Foto: Whgler, WikiMedia)

Die Zweigleisigkeit ist ein für Schmalspurbahnen in Deutschland einmaliges Merkmal. Die Strecke wurde im Jahr 1888 gebaut. Nur Anfang des 20. Jahrhunderts baute man das zweite Gleis nach. Die Spurweite ist 900 mm (ich habe sie selbst nachgemessen!).
Die Infrastruktur- und Verkehrsgesellschaft „Borkumer Kleinbahn und Dampfschiffahrt GmbH“ verfügt über 7 Diesellokomotiven, 1 Dampflok, einen Triebwagen, etwa 30 Personenwagen, verschiedene Wagen für Gepäck und Güter und einige Autobusse. Die Personenwagen sind außen bunt und tragen Namen nach dem dortigen Dialekt, wie „Kiebitzdelle“ und „Tüskendöör“. Drinnen sitzt man auf Holzbänken. Die Gesellschaft bietet auch Schiffsausflüge zu den Seehundbänken an und verleiht Fahrräder. Man kann auch Sonderfahrten bestellen, beispielsweise mit der Dampflok.
Im Bahnhof Borkum sind Fahrkartenautomaten der DB und der NS. Die Fahrkarten beinhalten auch die Schiffsfahrt zu den jeweiligen Ländern.
Die Wagen werden gewartet und repariert in der „Werkstatt“-Anlage nahe dem Bahnhof Borkum. Die Strecke ist ca. 8 km lang und führt unterwegs durch eine Sperranlage um den

renkontis du aliajn trajnojn, tiel densa estas la trafiko. Kelkaj signaliloj egalas al tiuj de DB, ekz. la ŝakkvadratita kaj la trapezaj signalplatoj. Videblas ankaŭ signalplatoj haltopunktaj kun aldona blua lumo*. Ili estas muntitaj sube dekstre de la trako preskaŭ ternivele.



Signalplato haltopunkta kun blua lumo
eine H-Tafel mit blauem Licht
(Foto: Walter Ullmann)

Walter Ullmann

*) Rimarkigo de la red.:
La haltopunktan signalplaton kun la blua lumo oni renkontas ankaŭ ĉe DB-linioj ekspluatataj laŭ regularo de simpligita trajntrafiko kun teknika subteno per ŝaltitaj trakmagnetoj. La blua lampo signalas pasivŝaltitan 2000Hz-trakmagneton.

Deich zu passieren, der das Städtchen gegen Überflutungen schützt. Das Tor kann bei Bedarf geschlossen werden. Unterwegs zum Bahnhof geschah es, dass wir in der Gegenrichtung zwei anderen Zügen begegnet sind. So dicht ist der Verkehr. Einige Signale gleichen denen der DB, z.B. die Schachbrett- und die Trapeztafel. Man sieht auch Haltetafeln mit einem zusätzlichen blauen Licht*. Sie sind unten rechts des Gleises fast auf dem Erdboden befestigt.



(trad. Ullmann)

*) Anmerkung des Red.:
Der Haltetafel mit dem blauen Licht begegnet man auch bei der DB-Strecken, die nach den Regeln des Zugleitbetriebs mit technischer Unterstützung durch schaltbare Gleismagnete betrieben werden. Die blaue Lampe zeigt die Passivschaltung des 2000Hz-Gleismagneten an.

Invito al Beroun: 6-a ĝis la 11-a de Majo 2022



Niaj ĉeĥaj geamikoj estas spertaj organizantoj de IFEF-kongresoj. Post la 43-a en Olomouc, la

Einladung nach Beroun: 6. bis 11. Mai 2022

Unsere tschechischen Freundinnen und Freunde sind erfahrene Organisierer von IFEF-Kongressen. Nach dem 43. in Olomouc, dem 53. in Tábor und dem 63. in Liberec sind wir eingeladen, am 73. Kongress in Beroun teilzunehmen. Der Ort des Kongresses befindet sich in Richtung Pilsen ca. 30 Kilometer westlich von Prag.
Wir weisen darauf hin, dass die Daten zur Vermeidung von Kollisionen mit anderen Esperanto-Veranstaltungen geändert wurden.

53-a en Tábor kaj la 63-a en Liberec ni estas invitataj partopreni la 73-an kongreson en Beroun. La kongresloko troviĝas en direkto Plzeň ĉ. 30 kilometrojn okcidente de Prago.
Ni atentigas, ke la datoj por eviti koliziojn kun aliaj Esperanto-aranĝoj estas ŝanĝitaj. Alie ol anoncite en la kongresa broŝuro de la 72-a IFK (virtuala TRAKO) la kongreso ne okazos en Junio sed de la 6-a ĝis la 11-a de Majo 2022.



La burgo Křikovlát / die Burg Křikovlát
eine H-Tafel mit blauem Licht
(Foto: Melechowsky, WikiMedia)

La kongresa komitato povas varbi per riĉa historio de la urbo Beroun dokumentita de originale antikvaj kaj rekonstruitaj domoj kaj remparoj. Faka ekskurso - specialaĵo por signalteknikaj interesuloj - kondukos al la regcentralo en la praga kvartalo Libeň, de kie depost 2016 estas regataj tri gravaj linioj ĉirkaŭ Prago kaj en kies fina konstruŝtupo deĵoru 145 personoj respondecaj por linioj longaj entute 2.200 km.
Celoj de turismaj ekskursoj estas ekz. la burgo de Křikovlát kaj la fervoja muzeo Lužná u Radkovníka kun granda kolekto da lokomotivoj kaj signalteknikaj instalaĵoj. La postkongreso en Pardubice ofertos krom trankvilan programon ankaŭ multajn interesajn ekskursojn.
La kongresa informilo kun multaj pliaj detaloj estas elŝutebla de la IFEF-retpaĝo http://ifef.free.fr/IFK2022/IFEF-73a-IFK-2022-Informilo.pdf.
Tie troviĝas ankaŭ la ligilo al la kongresa retpaĝo http://kongreso.wz.cz/

Guido Brandenburg

Anders als in der Kongressbroschüre des 72. IFK (virtuelles TRAKO) angekündigt wird der Kongress nicht im Juni, sondern vom 6. bis zum 11. Mai 2022 stattfinden.
Das Kongress-Komitee kann mit einer reichen Geschichte der Stadt Beroun werben, die mit original antiken und wiederaufgebauten Häusern und Befestigungsanlagen dokumentiert ist. Eine Fachexkursion – eine Spezialität für signaltechnisch Interessierte – wird zur Betriebszentrale im Prager Stadteil Libeň führen, von wo aus seit 2016 drei wichtige Strecken um Prag gesteuert werden und in deren letzter Baustufe 145 Personen für Strecken mit einer Länge von insgesamt 2.200 km verantwortlich sein werden.
Ziel touristischer Ausflüge sind z.B. die Burg Křikovlát und das Eisenbahn-Museum Lužná u Radkovníka mit einer großen Sammlung von Lokomotiven und signaltechnischen Anlagen. Der Nachkongress in Pardubice wird neben einem ruhigen Programm auch viele interessante Exkursionen anbieten.



La lokomotivremizo de Lužná u Radkovníka
der Lokschuppen von Lužná u Radkovníka
(Foto: Jiří Bernard, WikiMedia)

Die Info-Broschüre mit vielen weiteren Details kann auf der IFEF-Seite heruntergeladen werden http://ifef.free.fr/IFK2022/IFEF-73a-IFK-2022-Informilo.pdf
Dort findet sich auch der Link zur Seite des Kongresses http://kongreso.wz.cz/

(trad. Brandenburg)



Annelies Rudolf 07.07.1942 - 25.09.2021

Kassel, Varna, Colmar, Málaga, Haltern - la Ge-Rudolfojn ni kutimis renkonti nur kiel vojaĝeman paron, iniciatemaj, energiaj kaj helpantaj sin reciproke spiti la defiojn de la aĝo.
Des pli aflikta estas la mesaĝo ke Annelies, la fratino, en Septembro mortis 79-jara, ke nun mankas la dua el la duopo.
Ni kondolencas al Rainer Rudolf, kiu ne nur funebras pro sia perdo, sed sen apogo de Annelies estas devigata novordigi sian vivon.
Ni deziras al li la necesajn forton kaj kuraĝon por trovi sian novan lokon.



Guido Brandenburg

Kassel, Varna, Colmar, Málaga, Haltern – wir waren gewohnt, die Rudolfs nur als reisefreudiges Paar zu sehen, die sich initiativ und energisch gegenseitig halfen, den Herausforderungen des Alters zu trotzen.
Umso bedrückender ist die Nachricht, dass Annelies, die Schwester, im September mit 79 Jahren gestorben ist, dass nun die Zweite in dem Paar fehlt.
Wir kondolieren Rainer Rudolf, der nicht nur wegen seines Verlustes trauert, sondern ohne die Stütze von Annelies gezwungen ist, sein Leben neu zu ordnen.
Wir wünschen ihm die erforderliche Kraft und den Mut seinen neuen Platz zu finden.

(trad. Brandenburg)

Surteraj tagoj

Ĝojo kaj feliĉo estas
tre maloftaj sur la Ter',
vundoj tre profundaj restas,
dolorigas la sufer'.

Tial ĝuu la vivhorojn
regalitajn nun al vi!
Vane ilin ne pasigu,
dum vi estas tie ĉi!

Ĝoju vi pri ĉiu floro
kaj pri ĉiu kara vort'!
Tenu ĝin en via koro,
firme kaj per tuta fort'.

Traduko Manfred Retzlaff

Äerdendage

Glück un Fraid' in Äerdendagen,
de sind manksen dünne sait,
swaor häs du daoran to gnagen,
wenn de Wunnen ligget daip.

Daorüm nütz de schönen Stunnen,
weck dat Liäben di beschiärt,
allto gau sind se verswunnen,
diene Tiet nich eewig währt.

Frai di üöwer jedde Bloome,
üöwer jeddet guede Waort,
deel dat Glück un dienen Juwel
holl se fast, laot se nich gaohn.

Joseph Düpjohann



Redaktofino por FE 01/2022 estos la 15.02.2022		Redaktionschluss für FE 01/2022 ist der 15.02.2022	
Eldono:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.	Herausgabe:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redakcio:	Guido Brandenburg	Redaktion:	Guido Brandenburg
Adreso:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt	Adresse:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefono:	02508-9107	Telefon:	02508-9107
Fakso:	02508-984511	Fax:	02508-984511
Retpoŝto:	fervoja.esperantisto@t-online.de	Email:	fervoja.esperantisto@t-online.de
Kotizkonto:		Beitragskonto:	
Nomo	BSW Esperanto Essen	Name	BSW Esperanto Essen
IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63	IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC:	GENODED1SPE	BIC:	GENODED1SPE
Donacoj estas bonvenaj sur konto:		Spenden sind willkommen auf dem Konto:	
Nomo	Andreas Diemel GEFA	Name	Andreas Diemel GEFA
IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29	IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29
BIC:	GENODEF1S12	BIC:	GENODEF1S12